

& Mahadeva kaj la unua virino:

< Rekante 11 el 19 batoj por strofo, entute 2071 paŝoj dum 23 minutoj. Hindan fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, Tenerife 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:19> (/mimi sofa mire mido; soso tila sofa (fami)?(miso);

(#Rekantaĵe: mimi sofa mi re; dore mi re; mimi sofa mi re)

)×119)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 /Mahadeva, la pradio, ; tre tedita de l' Nenio,

(×:; **Kreis mondon tutan ; El nenio ; Kreis mondon tutan.**)

'2 post decido kreon ludis ; la Malplenon li plenŝutis... ..

'3 Li, la magiisto spaca, ; prakoleg' de l' foirplaca,

'4 Sunon, Lunon aperigis, ; fajrajn diskojn diskurigis... ..

'5 Tiel – por pli iluzia ; pireteknikaĵo dia –

'6 steloj en senlima vasto ; tien reen kun lumkvasto

'7 spiralmove dancis febraj ; sur mil vojoj nevideblaj.

'8 Jene en la densa nigro ; komenciĝis ŝvebo, migro,

'9 en koloroj tre diverse ; radiadis Lum' disperse,

'10 kaj trabilis dia Helo. ; Preta estis la Ĉielo.

,&2:

'11 Mahadeva, la pradio, ; jam el astra Materio

'12 knedis Teron, nian mondon. ; Li skulptadis valon, monton,

'13 elkavigis lagon, maron, ; fingre boris la grotaron,

'14 poste grace sur surfacon ; disen donis di-donacon:

'15 al aero – blukoloron, ; al ebena – herbon, floran,

'16 al la valo – la profundon, ; al montalto – neĝabundon,

'17 al la maro – tajdan kreskon, ; al la ondoj – blankan kreston,

'18 al la humo – la fekundon, ; al la Tempo – la sekundon,

'19 al la vento – fajfo-sonon, ; al tropiko – varmo-zonon,

'20 al polusoj – krudan froston ; al la Vivo – mortokoston.

,&3:

'21 Mahadeva, la pradio, ; revis nun pri rava io.

'22 Do lilion li deŝiris, ; al ĝi sian penson spiris

'23 kaj ĵetinte ĝin en maron ; li atentis la ondaron... ..

'24 La lilio lante flosis, ondulante ĝi ripozis,

'25 sed subite el ondkresto ; rave levis sin sen vesto

'26 kiel la lilio blanka, ; kiel ondoj rapidlanga,

'27 kiel Belo kordetrua ; Virineto la Unua.

'28 Borden kuris ŝi senpeka, ; eĉ mirakle – tute seka.

'29 (Ho, de tiam, jen fatalo, ; ke virino el skandalo

'30 ĉiam venas – tute seka; nur la viro restas – peka.)

,4:

'31 Mahadeva, la pradio, ; ŝin aprobis per ĝojkrio:

'32 "Mia revo korpiĝinta, ; ci sukcesis admirinda!

'33 Ciaj ĉarmo kaj naivo ; estu la ridet' de l' Vivo!"

'34 Pri destino ŝi konsentis: ; "Jen eĉ dio komplimentis!

'35 Bela estas mi, tre bela, ; en la mondo eĉ plej bela,

'36 Paradante kiel pavo ; paŝis ŝi kun vanta gravo,

'37 ŝi agnoskis sen aplombo: ; "Nu, beletas ankaŭ mondo!"

'38 Sed kiam la tago pasis, ; la feliĉo ŝin forlasis;

'39 tedis ŝin la muta miro, ; kaptis ŝin je Voĉ' – sopiro.

'40 Ŝi komencis jam lamenti, ; al la dio iris plendi:

,&5:

'41 "Mahadevo, dio granda, ; al Ci venis mi plendanta!

'42 Honte je dia prestiĝo ; min muelas – malfeliĉo!

'43 Bela estas mi, tre bela, ; ne ekzistas ja pli bela,

'44 sed nenio ĝin prifestas... ; Aĥ, mi malfeliĉa estas!"

'45 Mahadeva pensis, pensis ; kajla mankon tuj kompensis,

'46 kaj li kreis – kantobirdojn ; por laŭdigi ŝiajn virtojn... ..

'47 Korkaresaj kantoj ekis, ; ŝin flatanteĉie eĥis.

'48 Pasis ne pli – duontago, ; jen incitis ŝin imago,

'49 (ke glorado ne sufiĉas.)×

'50 La virino relamentis, ; al la dio jene plendis:

,&6:

'51 "Mahadevo, dio granda, ; al Ci venis mi plendanta!

'52 Bela estas mi, tre bela, ; la perfekte subĉiela... ..

'53 Distras min la birdotrililo, ; sed min pikas – maltrankvilo.

'54 Kia belo estas tio, ; se imitas ĝin nenio?

'55 Mahadeva pensis, pensis ; kaj la mankon tuj kompensis;

'56 jen kreiĝis – parodio ; pri virino – la simio.

'57 Ĝi imitis kaj grimacis... ; La komiko al ŝi plaĉis.

'58 Dum ĝi ŝin, ŝi ĝin imitis, ; la virino ĝoje ridis... ..

'59 Pasis ne pli – kvarontago, ; instigate de l' imago

'60 ŝi kuregis al la dio ; plende peti lin pri io:

,&7:

'61 "Mahadeva, ĉiopova, ; revas mi pri io nova!

'62 La simio, bridotrililo ; ne sufiĉas por trankvilo.

'63 Pensu, estas mi tre bela, ; ne ekzistas ja pli bela,

'64 tion Ci mem devis senti ; kaj post kreo komplimenti.

'65 Superombro Cin kompreno! ; Mankas al mi – ĉirkaŭpreno!

'66 Mahadeva pensis, pensis ; kaj la mankon tuj kompensis.

'67 Milde sible kiel tento ; jam alglitis la – serpento.

'68 Al ŝi flate, peton solve ; sin ĝi premis ĉirkaŭvolve.

'69 "Nu, jes, estas tre feliĉe, ; sed... – ŝi kriis – nesufiĉe!"

'70 Do al dio ŝi rekuris, ; plendis, petis, eĉ postulis:

,&8:

- '71 "Mahadeva, plenpotenco, ; por la Belo konsekvenco,
- '72 keĝi vekas ja – envion! ; Nun mi devas timi ĉion.
- '73 Mia belo admirata ; devus esti eĉ gardata,
- '74 ĉar atenco min ektrafus, ; se defendon mi ne havus".
- '75 Mahadeva pensis, pensis ; kaj la mankon tuj kompensis.
- '76 Donis li por ŝi patronon ; tuj kreinte la – leonon... ..
- '77 Ĝi ŝinsekvis ĉiupaŝe, ; kaj tremigis. Ŝi do kaŝe
- '78 Jam decidis meti finon, ne plu havi ĉiam timon.
- '79 Kiam pasis – unu horo ; kuris ŝi al la Sinjoro
- '80 kaj komencis tuj lamenti, ; ree peti, ree plendi:

,&9:

- '81 "Mahadeva, dio granda, ; min, ho, estu kompatanta!
- '82 Min mi sentas mallibera! ; La leono, tre danĝera,
- '83 ne nur firman gardon donas, ; sed ĵaluze min spionas.
- '84 Pensu, min neniu amas ; kaj mi por nenio flamas!
- '85 Se Ci donis al mi koron, ; donu al ĝi – kortrezoron!"
- '86 Mahadeva pensis, pensis ; kaj la mankon tuj kompensis,
- '87 ĉar ne pasis eĉ sekundo, ; jen aperis – eta hundo.
- '88 La virino ridis, ĝojis, ; dum la hundo flate bojis,
- '89 salte dancis vostosvinge ; kaj kuradis ronde ringe.
- '90 Ŝi jubilis el korfundo: ; "Cin mi amas, ĉarma hundo!"

,&10:

- '91 Pasis ne pli – kvin minutoj, ; kaj ŝanĝigis la kondutoj,
- '92 ĉar deziri ŝi ne povis, ; tutan mondon teda trovis.
- '93 Jen ŝi prenis do bastonon, ; batis hundon kaj leonon... ..
- '94 Hundo boje tuj rifuĝis, ; la leon' forire muĝis.
- '95 Ŝi nun ĉiam pli kolere ; furiozis plu forpele;
- '96 ŝi ekdraŝis kiel lenton ; la simionkaj serpenton... ..
- '97 Sible la serpent' forglitis, ; la simio forrapidis.
- '98 Senindulge en arbaron ; pelis ŝi eĉ la birdaron
- '99 kajĉagrene – kion fari? – ; lasis ŝi sin terenfali
- '100 kaj ekploris senkonsola ; ĉar ŝi estis tute sola:

,&11:

- '101 "Mahadeva povoriĉa, ; estas mi tre malfeliĉa!
- '102 Mi kondukis... jes, kaprice... ; Nu, ne tro, sed jen malice
- '103 ĉiu besto nun forestas... ; Fakte tio jam atestas,
- '104 dum ekzistas vol' libera, ; vanos esti – la plej bela.
- '105 Por mikreu beston tian ; (ĝi ne havu volon sian),
- '106 kiu devus al mi flati, ; kiun rajtos mi eĉ bati!"
- '107 Mahadeva strebis pensi, ; "kiel mankon nun kompensi?"
- '108 Fine – ĝentilhomecede – ; kreis bestonli laŭpete,
- '109 eĉ la plej humilan specon ; (ne la viron!) nur la – edzon.)